Jorge Camacho Cordón. . . . . . . . . . . . . . . . . . Madrid
Samuel Adebowale . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Madrid
José Ramón López Tejerina . . . . . . . . . . . . . Madrid
Leopoldo Fernández Mamerto . . . . . . . . . . . Madrid
Alfonso Borrego Cuesta . . . . . . . . . . . . . . . . Madrid
Pedro Mª Sanz Sanz . . . . . . . . . . . . . . . . . . Madrid
Antonio González Fernández . . Alcobendas (Mad.)
José Manuel Cabrero Santos . . S. Lorenzo del Escorial
Marcos Cruz Martín. . . . . . . . . . . Pozuelo de larcón
Manuel Pancorbo Castro . . . . . Galapagar (Madrid)
Aníbal Rodríguez Hoffmann . . Colmenarejo (Mad.)
Maritza Graziani Fernández . . . . . . . . . . Valdemoro
Fernando Moral Albo . . . . . . . . . . . . . . . Valdemoro
Luis Ignacio Traver Aguilar . . . Matalpino/El Boalo (Madrid)
Ainhoa Álava . . . Villanueva de la Cañada (Madrid)
José Luis Iglesias de Frutos. . . . . Alcalá de Henares
David Galadí-Enríquez . . . . . . . . Alcalá de Henares
Alejandro Gárgoles . . . . . . . . . . Torrejón de Ardoz
José Antonio del Barrio Unquera . . . . . . . Alcorcón
Antonio Rodríguez del Pino . . . . . . . . . . . Alcorcón
Rafael Arroyo Sualdea. . . . . . . . . . . . . . . . Alcorcón
Ricardo Felipe Albert Reyna . . . . . . . . . . Móstoles
Manuel Sánchez Rosado . . . . Fuenlabrada (Madrid)
Paco Ríos . . . . . . . . . . . . . . . . Humanes de Madrid
Manuel Manteca López . . . . . . . . . . . . . . . . Málaga
Eduardo Vargas (Solo Tronik) . . . . . . . . . . . Málaga
Andaluzia Esperanto-Unuigho . . . . . . . . . . . Málaga
Ángel Arquillos López . . . . . . . . . . . . . . . . . Málaga
José Francisco Martín del Pozo . . . . . . . . . . Málaga
Francisco Hernández Gil. . . . . . . . . . . . . . . . Murcia
Fernando Onsalo Cochero. . . . . . . . . . . . . . . Murcia
Jesús de las Heras Jiménez . . . . . . . . . . . . . Murcia
Juan Antonio Cabezos Martínez . . . . . . . . . . Murcia
Ana Mª Hernández-Ros Codorniu . . . . . . . . Murcia
José Pina Tuells . . . . . . . Cabezo de Torres (Murcia)
Francisco-Manuel Andugar Manrique . . Santomera (Murcia)
José Arroyo García . . . . . . . . . . . . . . . . . . Cartagena
Océano López Pérez . . . . . . . Manga del mar menor (Murcia)
Enrique Gago Robles Santiago de la Ribera(Murcia)
Tomás Ortiz García . . . . . . . . . San Javier (Murcia)
Eduardo Segura González . . . . . . . Lorca (Murcia)
Rafael Rodríguez Varela . . . . . . . . . . . . . . Ourense
Livia Fuertes Mouriño. . . . . . . . . . . . . . . . Ourense
Mª Jesús Fuertes Mouriño . . . . . . . . . . . . . Ourense
Ildefonso Domínguez Losada . . . . . . . . . . . . Gijón
Ángel García Sánchez . . . . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Santiago Mulas Gallego . . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Astura Esperanto-Asocio. . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Julio Argüelles García . . . . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Faustino Castaño Vallina . . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Juan Manzano Bartolomé . . . . . . . . . . . . . . . . Gijón
Ben Parkinson . . . . . . . . . . . . . . . . Villalegre-Avilés
María Luisa Menéndez . . . . . . . . . Avilés (Asturias)
Esperanto-grupo Antaŭen . . . . . Llaranes (Asturias)
Manuel Santana Navarro . . . . . Las Palmas de G.C.
Laurentina Parada Pérez . . . . . . Las Palmas de G.C.
José González Betancor . . . Oasis de Nazaret (G.C.)
Antonio Valén Fernández . . . . . . . . . . . . . . . . Vigo
Esperanto-Grupo "Paco kaj Amo" . . . . . . . . . Vigo
Mª Elvira Álvarez Iglesias . . . . . . . . . . . . . . . Vigo
Jaime Canoa González . . . . . . . . . . . . . . . . . . Vigo
Pío Moa Banga . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Vigo
Aurelio Solís Pí . . . . . . . . . . Santa Cruz de Tenerife
Antonio M. Sánchez Pérez. . Santa Cruz de Tenerife
Orlando Hernández San Ginés . . . Santa Cruz de Tf.
Krystina Krause de Goralski . . . . Santa Cruz de Tf.
Francisco José Dávila Dorta . . . . . . . . . . La Laguna
ESTO/Sociedad Esperantista de TenerifeLa Laguna
Antonio Ferrer Hervás. . . . . . . . . . . . . . . La Laguna
Cosme Gómez Pérez . . . . . . . Candelaria (Tenerife)
Manuel Sosvilla Massieu. . . . Sta Cruz de La Palma
José Morales Martínez . . . . . . . . . . . . . . . Santander
Susana Gutiérrez Rivero. . . . . . . . . . . . . . Santander
Pilar Vivas Herrero . . . . . . . . . . . . . . . . . . Santander
Ángel García Gutiérrez. . . . . . . . . . . . . . . Santander
Juan Azcuénaga Vierna . . . . . . . . . . . . . . Santander
Pablo González González. . . . . . . . . . . . . Santander
Luis Serrano Tausia . . . . . . . . . . . . . . . . . Santander
Mercedes García Fernández . . . . . . . . . . . Santander
Kantabra Esperanto-Asocio . . . . . . . . . . . Santander
Miguel Gutiérrez Adúriz. . . . Muriedas (Cantabria)
Ismael Hossany Díez González . . Liérganes (Cant.)
Fco. Javier Rincón Prieto. . . . . . . . . . . . . . . Segovia
Pablo Vicente Valero . . . . . . . . . . . . . . . . . . Segovia
Julio Marín Pérez . . . . Palazuelos Eresma (Segovia)

Douglas B Mc Clure . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Sevilla
Antonio Rodriguez Gasch . . . . . . . . . . . . . . . Sevilla
Ángel Torres Pacho . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Sevilla
Carmelo Rivero Romero . . . . . . Espartinas (Sevilla)
Lázaro Rubio Martínez . . . . . . . . . . . . . . . . . . Soria
Josep Mª Serrano Subietas . . . . . . . . . . . . Tarragona
Llibert Fort Rius . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Reus
Florencio Serrano Gil . . . Roda de Bará (Tarragona)
Valencia Esperanto-grupo . . . . . . . . . . . . . . Valencia
José Pérez Sempere. . . . . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Fernando Manzanera Más. . . . . . . . . . . . . . Valencia
Ángel Mañero González . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Francisco Marco Máñez . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Rafael Herrero García. . . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Santiago Miquel Planas . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Vicent Martorell Eixarch . . . . . . . . . . . . . . Valencia
José Añó Belda . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Pascual Pont Martinez . . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Juan Cristóbal Cerezo López . . . . . . . . . . . Valencia
Rafael Peris Solaz . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Valencia
Alberto Granados Orcero. . . . . . . . . . . . . . . Picanya
Grupo de Esperanto Lumradio . . . . . . . . . . . Cheste
Walter Máñez Cariñena . . . . . . . . . . . . . . . . . Cheste
Francisco Ramírez Baldoví . . Almussafes (Valenc.)
Maite Pérez Salort . . . . . . . . . . . . . Oliva (Valencia)
Luis Salag Laguarda . . . . . . . . . . Mislata (Valencia)
Juan Miguel Zarandona Fernández . . . . . Valladolid
Pedro Antonio Garrote Escribano . . . . . . valladolid
Luis E. Hernández García . . . . . . . . . . . . Valladolid
Rafi Urueña Álvarez . . . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
Jonás Castro Toledo . . . . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
María García . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
Luis Pelayo Fernández. . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
Luis Martín Herrero . . . . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
César Lobo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Valladolid
Esperanto-grupo "Fido kaj Espero" . . . . . Valladolid
Rodrigo Portela Sánchez . . . . . . . . . . . . . Valladolid
David Redondo Rodríguez. . . . . . . . . . . . . . . Bilbao
Grupo Esperantista de Bilbao . . . . . . . . . . . . Bilbao
Eduardo Larrouy López. . . . . . . . . . . . . . . . . Bilbao
Teodoro Ibáñez Martín. . . . . . . . . . . . . . . . . . Bilbao
José Luis Bringas Tellechea. . . . . . . . . . . . . . Bilbao
Jesús Miguel García Iturrioz . . . . . . . . . Las Arenas
Víctor Ortiz Gratal. . . . . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Esperanta Societo Frateco . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Antonio Marco Botella . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Jaime Benito Cedo. . . . . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Gregorio Sobrino Utrilla . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Joaquín Bielsa Vispe . . . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Manuel Ortigosa Bernal. . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
José Vicente Garcés Puyuelo . . . . . . . . . . Zaragoza
José Miguel Filera Gil . . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
María Fernanda Ondé Berroya . . . . . . . . . Zaragoza
Antonia Lapuerta Palacios. . . . . . . . . . . . Zaragoza
Nicolás López Escartín . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Lorenzo Noguero Sarasa . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Pablo T. Conesa García . . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
Víctor Manuel Arribas Oteo . . . . . . . . . . . Zaragoza
Juan Carlos Nuño Casión . . . . . . . . . . . . . Zaragoza
José Antonio Fleta Zaragozano . . . . . . . . . Zaragoza
Miguel Ángel Martín Martín . . . . . . . . . . . Zaragoza
Sabino Feo Pelegrín Colomo Ejea de los Caballeros
Mª Pilar Tamayo Hornero . . Ejea de los Caballeros
Daniel Sabino Pelegrín Tamayo . . . Ejea de los Cab.
Gloria Inés Daverio de Oro. . . . . . . . . . . . . . . Ceuta
José Antonio Valverde Martín . . . . . . . . . . . Melilla
Javier Mercado Albert . . . . . Edinburgh / Skotlando
Josep Mª Claramunt . . . . . . Oaxaca oax (Meksikio)
Pepita Criach de Caspary . . . . . . . Asker (Norvegio)
Fernando de Diego de la Rosa . Wroclaw (Pollando)
Augusto Casquero de la Cruz . . . . . Bydgoszcz (PL)
Fernando Costa Lavra. . . . Matosinhos (Portugalio)
Sergio Docal Puig . . . . . . . Washington, dc (Usono)

Novaj membroj en 2003:16


Perditaj membroj en 2003: 69

El ĉi lastaj, 5 forpasis, 5 eksiĝis eksplicite kaj la ceteraj estis eksigitaj pro plurjara nekotizado.

Rezulte, la membraro malkreskis je 14%.

*La sekretario, Manolo Parra*

# Biblioteko Juan Régulo




Jen listo de la libroj donacitaj al la biblioteko Juan Régulo, dum 2004, ĝis la fino de marto.

* **Kristnaska kordo**; Akordo; 2003; nl; Aĉetita de HEF.

* Del Barrio, Toño; "Lo que es la vida" RNE 1; 2003.

* **Vortkreaj procezoj de Esperanto**. Kiselman, Christer O. 1990; se; Jorge Camacho.

* **Esperantologio. Esperanto studies**. Kiselman, Christer (Redak.); (kajero 1 -1999- Issue n-ro 1); Bambu; 1999; bg; Jorge Camacho.

* **Kulturo: valoro aŭ varo?** (kongresa temo de la 81a Universala Kongreso. Prago, julio 1996); Le Puil, Jack (redak.); La KromKancerKliniko; 1996; fr; Jorge Camacho.

* **La kancerkliniko-krestomatio**. "GeLKKpoetoj". Le Puil, Jack (redak.); Vol. 4; La KancerKliniko; fr; Jorge Camacho.

* **Stilekzercoj**; Queneau, Raymond; La KromkancerKliniko; 1986; fr; Jorge Camacho.

* **La majstro kaj Margareta**. (Versa resumo); Bulgakov, Miĥail; La KromkancerKliniko; 1987; fr; Jorge Camacho.

* **Ĉi-semajne eĉ ajn-mise**. MacGill, Stefan; La KromkancerKliniko; 1998; fr; Jorge Camacho.

* **Kvarlingva (franca-angla-germana-esperanta) proverbaro**. Bourgois, Lucien; La KromkancerKlinikoteko; 2000; fr; Jorge Camacho.

* **La orelringo (ajnaĵo) + Ŝimstatoj (poemoj)**; Danvy, Jopetro; La KromkancerKliniko; 1994; fr; Jorge Camacho.

* **Belarto**. Auld, William (redak.); Suplemento al la revuo "Esperanto". n-ro:1 apr. 1958; UEA; 1958; nl; Jorge Camacho.

* **Belarto**. Auld, William (redak.); Suplemento al la revuo "Esperanto". n-ro:2 aŭtuno 1961; UEA; 1961; nl; Jorge Camacho.

* **La degenero de William Auld**. Diego, Fernando de; Recenzo pri "Montara vilaĝo"; Artur E. Iltis; 1985; ch; Jorge Camacho.

* **Ankoraŭ pri la degenero de William Auld**. Diego, Fernando de; Pri recenzo kaj ties sekvoj. Artur E. Iltis; 1987; ch; Jorge Camacho.

* **La tradukarto kaj ties problemoj**. Konsiloj por eventualaj tradukistoj de la franca al esperanto. Cherpillod, André; La BlanchetiŜre; 2003; fr; Jorge Camacho.

* **Mateo Falkono** (Mateo Falcone); Mérimee, Prosper; La BlanchetiŜre; 2003; fr; Jorge Camacho.

* **Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo**. Blanke, Detlev; UEA; 2003; nl.

* **En la komenco estas la vorto**; Mattos, Geraldo; Fonto; 2000; br.

* **Kaj kiu pravas. Memorspertoj**. Zilah, Eugene de; Pro Esperanto; 2002; at; Jorge Camacho.

* **Esperanta frazeologio**; Fiedler, Sabine; UEA; 2002; nl; Jorge Camacho.

* **Krias la silento**; Nemere, István; Eldonejo Bero; 2002; us; Jorge Camacho.

* **Angla antologio (1000-1800)**; Auld, William kaj Rossetti, Reto (redak.); UEA; 1957; nl; Jorge Camacho.

* **Hungara antologio**; Kalocsay, K.; Literatura mondo; 1933; hu; Jorge Camacho.

* **Krieg in Spanien 1936-1939**; Kühne, Horst; Militõrverlag; 1986; de; Jorge Camacho.

* **Asteriks la gaŭlo**; Goscinny kaj Uderzo; Ehapa-Verlag; 1973; de; Jorge Camacho.




* **La krabo kun oraj pinĉiloj**. Hergé; Casterman; 1981; be; Jorge Camacho.

* **La enigmo de l' ar@neo**; Montagut, Abel; IEM; 2003; at; Jorge Camacho.

* **Enkonduko en la verkaron de Miguel Espinosa**; Camacho, Jorge; (El "Menade Bal Püki Bal". Festlibro por Reinhard Haupenthal. Edition Iltis; Jorge Camacho.

* **La gesta d'Utnoa**; Montagut, Abel; Pagés editors; 1996; es; Jorge Camacho.

* **Horizonte del esperanto**; Moya Escayola, Giordano; Barcelona Esperanto-Centro; 2004; es; Giordano Moya.

* **La hispana tragedio** Last, Jef; Libroservo de Federacio de Laboristaj Esperantistoj —nl—Sergej Maltev.

* **Vojaĝo en Esperantolando** Kolker, Boris; Universala Esperanto-Asocio, 2002 —nl— (la eldonejo).

* **Kristnaska kordo** Akordo; 2003 —nl— Aĉetita de HEF

*Ana Manero*

# Sterki kaj sterki konstante



La konata aŭtoro kaj tradukisto Sten Johansson konsentis prilumi siajn ideojn pri la estonteco de la Esperanto-movado. La unua paŝo laŭ li devus esti akcepto de la realaĵoj. Jen liaj piloloj por sanigo.

Laŭ iuj, la esperantomovado krizas. Laŭ aliaj tute ne, necesas nur silenti kaj lojali, kaj ĉio restos sankta harmonio, kiel ĉiame. Ĉu krizo, stagno, malondo aŭ nur kalmo? Ĉiel ajn, ŝajnas esti io putra en la stato de Verdlando. Jen dek dietaj preskriboj por memkuracado:

Forlasi la sektismon. Finfine ni entombigu himnon, standardon, Majstron kaj aliajn kvazaŭreligiajn trajtojn. Ni permesu rigardi Esperanton kaj la esperantistojn per la samaj nefermitaj okuloj kiel aliajn sociajn fenomenojn. Ni ne fanfaronu, ne hipokritu, ne pavu, ne papagu.

Forlasi la mitojn kaj la megalomanion. Ni ĉesigu la troigojn pri ĝisnunaj atingoj de Esperanto-uzado. Ni forgesu la fantomajn milionojn da nevideblaj, neaŭdeblaj kaj netuŝeblaj esperantistoj. Ni akceptu la realon: Esperanto estas uzata je tre varia nivelo de kelkaj dekmiloj da homoj dum malgranda parto de ilia tempo. Por tiuj homoj Esperanto tamen estas tre utila kaj plezuriga.

Forlasi la ekstreman desuprismon. Ni rezignu la postulojn, ke eta grupo da idealistoj decidu, per kiuj rimedoj UNO, EU aŭ unuopaj personoj komuniku internacie. Ni mem uzu Esperanton por nia propra bezono, tiel farante ekzemplon al la mondo. Ni uzu ĝin intense kaj por ĉiuj celoj. Ni flegu la kulturon kaj arton, sed ankaŭ la distron kaj amuzon.

Forlasi la antagonismon inter Esperanto kaj la angla lingvo. La bono ne estu malamiko de la plejbono. Ni akceptu kaj ĝoju, ke internacia komunikado por multaj homoj hodiaŭ estas pli amasa kaj pli glata ol antaŭ cent jaroj — dank' al la disvastigo de la angla lingvo. Nur sovinistoj kontraŭas komunikadon pro tio, ke ĝi ne okazas per la ĝusta lingvo.

Forlasi la monopolismon. Estus egocentra ideo pensi, ke utilas nur mia maniero agi por aŭ per Esperanto. Estus absurde pretendi, ke nur mia Esperanto estas la sola ĝusta. Ni komprenu, ke Espe-

ranto estas tio, kion esperantistoj uzas por interkompreniĝi. Kion ni faras en Esperanto, tion ni faru pro ĝia propra valoro, ne por "utili al nia kara lingvo".

Forlasi la amindumadon kun naciismaj rondoj izoliĝemaj kaj konservemaj. Ni laboru por internacia reciproka influo, ne por nacia aŭ paroha memsufiĉo.


Forlasi la seksismon kaj agismon. Ni malmuntu la virajn klikojn, kies anoj elektas unu la alian ne vidante la kompetenton de aliuloj. Ni emeritigu la veteranojn kaj fidu je la talento de homoj malpli ol 50-jaraj.


Forlasi la adoron je harmonio kaj konkordo. Ni ne plu kaŝu kaj prisilentu internajn konfliktojn kaj malkonsentojn, sen kiuj eblus neniu evoluo. Ni respektu kaj flegu la diferencojn.

Forlasi la izolon en landaj movadoj. Se ni havas lingvon internacian, kial ne uzi ĝin internacie? Ni ne revu pri tutmondeco, sed realigu ĝin.

Forlasi la blindan varbadon per troigoj kaj mensogoj. Finfine ni komprenu, ke el cent varbitoj naŭdek naŭ foriras, ĉar ili ne trovas utilan aŭ plezurigan uzon de la lingvo. Prefere ol varbi cent novajn, ni zorgu krei ion allogan kaj valoran, por ke pli multaj varbitoj restu uzantoj. "Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante." Ĉu ni ne provu foje ankaŭ sterki?

*Sten Johansson*




# Surprizo!

La kongreso de Bilbao estos riĉa rilate al la rikolto de novaj verkoj en kaj pri Esperanto. Krom la hispanlingva "El esperanto: lengua y Cultura" de Antonio Valén, kaj la oka numero de la serio Hispana Literaturo "Suzana kaj la ĉasistoj de muŝoj" de Pío Baroja, ni ĉiuj povos ĝui du novajn librojn de la hispana verkisto Jorge Camacho.

Ĉu surprizo? Jes por la publiko, sed ne por liaj plum-kamaradoj, kiuj, disfoje, havas la plezuron private legi liajn novajn poemojn.

Ambaŭ verkoj, kiuj aperos sub la marko de la eldonejo Bero, estas poemaroj. La unua "Celakantoj" estas plene esperanta, sed la dua "Saturno" estas dulingva volumo kun poemoj, originale verkitaj jen en Esperanto, jen en la hispana lingvo, kun iliaj respektivaj tradukoj.

Du frandaĵoj. Kredu min.

*M. Zocato*

# Ĉu la angla jam venkis?

Respondo de Seán Ó Riain, irlanda diplomato en Berlino, al homoj, kiuj sincere kredas ke la angla jam gajnis, "ke la vagonaro jam forvojaĝis", kiel diras multaj, kiuj ne malsimpatias kun Esperanto, sed kredas ke estas tro malfrue.

Kiel irlandano, mi povus respondi ke eĉ ĉe ni, kie ni eble antaŭas la ceteran Eŭropon ĉar ĉiuj jam parolas flue angle kaj la plimulto perdis la propran irlandan lingvon jam de 4 generacioj, granda movado daŭre luktas por la irlanda kaj ĝuste NE akceptas la aserton, ke la angla jam venkis.

1. Naciaj lingvoj similas al bestoj, kaj la angla, nuntempe la plej forta, al leono. Akcepti la nuntempan dominadon de la angla, nur ĉar ĝi estas fakto, similus al akcepto de situacio, ke ĉiuj bestoj en la bestoĝardeno vagu senkatene , nur ĉar ili rompis siajn kaĝojn. En tiu kazo la mortigo de ĉiuj aliaj bestoj fare de la leonoj samtiom certas kiom la mortigo de ĉiuj aliaj lingvoj se la nuna internacia uzo de la angla rajtus daŭri senbride.

Estas hipokrite ŝajnigi ke oni ne komprenas tion: "Domaĝe ke la aliaj bestoj/lingvoj ne estis sufiĉe fortaj por konkurenci kun la leonoj/angla en libera merkato. Ilia morto nur pravigas la superecon de la leonoj/angla." Kiam ni havas grandegajn diferencojn de forto inter lingvoj, kiel nun, estas la leĝo kiu liberigas, kaj la senbrida libereco kiu subpremas."

2. "La angla kiel internacia lingvo similas al la unua amasproduktita aŭto, la "model T Ford": ĝi signifis multege pli bonan situacion kompare al la antaŭ??a, sed kiu nuntempe ŝatus ŝanĝi sian novan BMW kontraŭ "model T Ford"? Esperanto, kiel internacia lingvo (kaj mi substrekas internacia, ne endas ke veras en aliaj uzadkampoj), estas la plej moderna BMW, aviadilo aŭ biciklo, laŭ via gusto."

3. "La angla similas al ruĝa rozo, bela kaj tre ŝatata floro. Sed kiu ŝatus ĝardenon plenan de ruĝaj rozoj, kun neniu alia floro? Al tia lingva ĝardeno kondukas la nuntempa senregula internacia uzo de la angla."

4. "Ankaŭ la franca "venkis" antaŭ unu jarcento. Latino venkis antaŭ 2000 jaroj, sed kie ĝi estas nun. Malgraŭ la anglalingva "venko", por komerci en Ĉinio, oni lernu la ĉinan.

5. Ĉu ĉiuj eŭroparlamentanoj regas la anglan? Se jes, por kio utilas tie la interpretistoj? Se ne, kie ĝi fakte "venkis"?

6. Anglalingvano en Mongolio povas, eble, atingi sian hotelon per la angla;

**"Le Monde Diplomatique"**

**Vera lukso en Esperanto!**

**http//eo.mondediplo.com**

# Esperanto estas viva lingvo!

"Post plurjara batalo hungariaj esperantistoj sukcesis rekonigi esperantan lingvon viva," diras Oszkar Princz, la ĝenerala sekretario de Hungaria Esperanto-Asocio. "Kompreneble por esperantistoj neniam estis dubo pri tio ke la esperanta lingvo laŭdevene estas artefarita, planita lingvo, sed ĝi fariĝis viva lingvo."

La Ministerio pri Instruado en letero informis la Hungarian Esperanto-Asocion, ke laŭ la deklaro de Lingvoscienca Instituto de Hungara Scienca Akademio Esperanto kvalifikiĝis kiel viva lingvo. Lastatempe, kelkaj ŝtataj instruinstitutoj ne volis taksi esperantan lingvon egalrajta al aliaj lingvoj. Ĉi tiu kvalifikado bremsis ĝis nun la instruadon de la internacia lingvo.

De la jaro 1995 estiĝis interesa fenomeno en Hungario pro la apero de leĝo pri la deviga ekzameniĝo pri fremdaj lingvoj en altlernejoj kaj universitatoj. "Ekde tiu tempo abrupte ekkreskis la nombro de tiuj gestudentoj kiuj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon," klarigas Princz, kiu ankaŭ kunordigas la esperanto-lingvoekzamenojn ene de la Fremdlingva Pluperfektiga Centro (FPC). La plimulto de gestudentoj dum la lastaj jaroj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon pri la lingvoj angla, germana, franca. En la jaro 2002 sur la popularecolisto la trian lokon okupis Esperanto, forpuŝante de la tria loko la francan.

Studentoj preferas Esperanton pro tio ke ĝi estas facile lernebla kaj la reguloj preskaŭ senesceptaj. Lingvistoj kalkulas ke komencanto bezonus sesonon de la tempo por lerni Esperanton ol aliaj lingvoj kiel la angla, franca aŭ germana. "Nun ni jam povas denove proponi Esperanton inter la elekteblajn studobjektojn de lernejoj funkciantaj sur ĉiuj niveloj." La sukceso, laŭ Princz, ankaŭ baziĝis sur la plurjardekaj esperantistaj agadoj kaj ĉefe tiu de esperantistaj lingvistoj jam mortintaj kaj de tiuj nun laborantaj en pluraj lingvaj institutoj, kaj universitataj katedroj.

*Brusela Komunikad-Centro*

---

Ĉu la angla... (daŭrigo)

Esperantisto povas diskuti kun mongoloj pri la mongola kulturo Esperante.

7. Se iu fanfaronas pri sia altnivela scipovo de la angla, proponu ke li klarigu angle: A. Kiel funciigi veturilon? B. Kiel fari terpoman omleton? Meznivela esperantisto, post kelkaj monatoj de diligenta lernado, kapablas.

*Seán Ó Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio*

# "Horizonte del Esperanto"

Mi faros etan komentarion de la libreto aperinta en hispana lingvo "Horizonte del Esperanto", malgraŭ la fakto ke, eble, mi ne estas la persono plej adekvata por plenumi tiun taskon, ĉar mi mem partoprenis iamaniere en la korektado de la teksto.

La aktuala versio temas pri traduko en la hispana lingvo de verko originale verkita en esperanto "Esperanto en prospektivo", de la elstara esperantisto S-ro Giordano Moya Escayola, kaj mi deziras reliefigi la intereson, kiun vekis ĉiam tiu libro, kaj sekve de tio ĝian tradukon en la korea kaj japana lingvoj, kiu fakto instigis Barcelona Esperanto-Centro-n (BEC) realigi ĝia tradukadon en la hispana lingvo, kiel ekzercado de la lernantoj de supera E-kurso de BEC.

Mi ne komentarios la verkon de S-ro Moya, ĉar tio estas ne oportuna, se konsideri ke la originala versio en esperanto estas ja tre konata. Tamen, mi deziras gratuli la iniciaton de BEC, kiu nun disponigas la verkon al pli vasta publiko, sub la nova titolo Horizonte del Esperanto, en la hispana lingvo.

La traduko klopodas esti kiel eble plej fidela al la originala teksto, pro tio, kaj pro la fakto ke la historiaj eventoj rapide sanĝiĝas, ni ankoraŭ trovas plurfoje referencojn al la ne plu ekzistantaj URSS kaj la "du blokoj". Same okazas, malfeliĉe, rilate al la la lastaj terorismaj kaj netoleremaj okazintaĵoj, kiuj montras ke, kontraŭe al la penso de la aŭtoro, bedaŭrinde, la religia fanatikeco ankoraŭ ne estas elradikigita. Certe tiuj temoj restas en la libro pro la deziro ne modifi la tekston nek la spiriton de la originala verko de la aŭtoro.

Fine, nur danki unu plian fojon al Barcelona E-Centro, kaj al ĝia Prezidanto S-ro Salvador Aragay, pro ilia konstanta laboro por la disvastigo de Esperanto kaj de ĝia originala literaturo.


*M. Rafaela Urueña*

# Intrigo-teatro

En la 68a Hispana Kongreso, okazinta en Valencio, oni prezentis verkon de Antonio Ruiz Negre, titolita "Intrigo-teatro", kiu konsistas el tri teatraĵoj: "Amara dolĉaĵo", "Cis la limo" kaj "Pri la koro", esperantigitaj de Julio Tarín kaj Santiago Miquel.

Antonio Ruiz Negre naskiĝis en Valencio en 1938a, kaj debutis en la sesdekaj jaroj. Li membras en pluraj verkistaj asocioj kaj liaj teatraĵoj estas studobjekto en altnivelaj seminarioj de kelkaj usonaj universitatoj. La nombro de liaj verkoj nombras jam pli ol 50. De la oka jardeko, Negre instruas kaj reĝisoras diver-




sajn trupojn, kiuj prezentis liajn kaj aliulajn verkojn.

En la tri komedioj de la volumo, lertaj intrigoj permesas al Ruiz Negre emfaze prezenti la kruelajn aspektojn de la krizoj (jen ekzistada, jen socia) de liaj personoj.

La alegoria portreto prezentita de Ruiz Negre en tiuj intrigo-komedioj estas morna kaj mizera, ĉar lia teatro montras la trajtojn de fiaskinta socio materia, en kiu la spiritaj valoroj tre malabundas.

La libron eldonis Grupo Esperanto de Valencia, kaj la prezo estas 8 eŭroj (la sendokosto estas inkluzivita).

# Con el esperanto en la mochila

269 paĝoj, formato 24 x 17 cm, Prezo: 17 eŭroj.

Jen, post sukcesa eldono en la kataluna "Amb l'esperanto a la motxilla", ĵus aperis la hispana traduko de verko, kiu estas la taglibro de mondvojaĝo en 79 tagoj de du homoj, sen aviadiloj, laŭ la fama romano de Jules Verne. Malkiel la du personoj de la franca verkisto, ili elektis vojaĝi ĉefe ne mare, sed tere, laŭ la Silka Vojo, Japanio, Usono kaj la elirurbo: Londono. La vojaĝo okazis kun granda tempopremo, tamen la mondvojaĝantoj renkontis afablajn esperantistojn ĉie en siaj haltoj, kio permesis al ili ĝui multajn vidindaĵojn kaj glatigis la vojaĝajn incidentojn.

La libro, atentokapte verkita, instigas legadon kaj evitas kliŝojn. Krome, ĝi estas humurplena. La aŭtoroj kombinas taglibran rakonton kun parentezoj jen enciklopediaj jen analizaj. Esperanto apearas en la libro tre nature: en la komenco oni iom klarigas pri ĝi kaj mencias la esperantistecon de Verne. Poste, laŭlonge de la libro, oni de tempo al tempo mencias ĝin, tiel ke oni klare vidas, ke la du aventuremaj vojaĝantoj uzadas ĝin por interkomprenigi ĉie.

Mendu ĉe Kataluna E-Asocio: <kea-kasisto@esperanto-ct.org>

# Civilizacio

Ekde la vigla interveno en 1999 de la kantisto de Strika Tango, Alejandro Cossavella, kun la tiuepokaj Porkoj, oni povis pensi ke lia baza kaj vigla roko estas frukto de elekto, devige neinversigebla, por trakonduki la lingvon de Zamenhof trans la barilojn kaj blenditajn pordojn per klabofrapoj. Ĉu tio estis pro manko de kulturo aŭ muzika tekniko sufiĉe klera, aŭ simple pro manko de pacienco por agi pli diplomate? Nu, domaĝe por la fanoj de tiu stilo same kiel por la alergiaj kritikantoj, Alejandro estas ĝisfunda artisto, plurfaceta kaj altgrade talenta kiu ne ĉesos surprizi nin!

Tiu ĉi nova albumo estas verko profunde inda je esperanta interkultura inklino, kaj ĝia aŭtoro, kiu postulas kun insisto la utilon de projekto transe de la lingvaĵo, ne hezitis lasi registri la klavarojn, blovinstrumentojn, kaj kelkajn perkutilojn de muzikistoj el diversaj horizontoj je miloj da kilometroj de sia hejma cirklo. Estas en la Studio de la Trappe, en la ejoj mem de Vinilkosmo, ke tiu muziko, tamen forte inspirita de la latinamerika tradicio, trovis la tutan deziratan plurecon de Ale, kaj eskapas samtempe la etikedojn kiuj tendencas limigi la radiadon de tiaj kreaĵoj.

Ne malpli ol 13 muzikistoj el pluraj malsamaj landoj partoprenis la surbendigadon, kaj por fini, La Desertoj Dezertaj, neformala bando, travidebla kaj abs-




trakta, kiel Ale priskribas ĝin al ni humure, konkludas per 3 aldonaj titoloj la verkon kiu jam estas densa kaj ebriiga.

Tiu ĉi albumo estas pompa, inspirita, saturita per la suno kiu vidis ĝin naskiĝi, kaj fariĝos tutcerte mejloŝtona referenco. Kaj se vi ne certe bone komprenis kial... aĉetu ĝin. Jen ĉio!

**Libroservo**

**Luis Serrano Pérez**

Font Nova 32, 08202 Sabadell

**luis_serrano@mixmail.com**

tel: 937-275-021

Konto ĉe *Banco Sabadell*:

**0081-0900-82-0006712480.**

